11-a JARO, N-o 434 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. OKTOBRO 1935

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT. bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

LA KONGRESURBO DE 1936

Manĉestro (Manchester), sidloko de la Kongreso en 1936 de SAT, troviĝas en nordokcidenta Anglio, 300 kilometrojn de Londono k meze de unu el la plej homplenaj partoj de la mondo. Ni komence konfesu, ke eĉ ĝia plej arda loka patrioto neniam nomas la urbon bela. Mankas tie tiuj antikvaj kasteloj, katedraloj, k la aliaj imponaj restaĵoj de pli frua epoko, kiuj ĝenerale logas vizitantojn.

Tamen, Manĉestro havas por ĉiu proleto profundan signifon k intereson, ĉar tie unue naskiĝis la moderna kapitalismo, k tie la laboristaro unue spertis ĝian subpremadon. Konata al ĉiu manĉestrano estas la « Batalo de Peterloo ». En 1819 50,000 laboristoj pace manifestaciante en la urbo pro manko de pano, estis senaverte atakitaj de soldatoj. Kelkdek estis murditaj k centoj vunditaj. Tiu batalo estis por la proletoj terura antaŭsigno de la potenciĝanta kapitalismo.

En la jaro 1830 malfermiĝis la unua fervojo en la mondo, kuranta de Manĉestro ĝis Liverpulo. Kelkajn jarojn antaŭe jam komenciĝis en la urbo la uzo de vapormaŝinoj ĉe la ŝpinejoj k teksejoj. Rapidege ĉi tiuj katunfabrikoj ruinigis la hejm-laboristojn, kiuj amasiĝis en la urbon serĉante laboron. Manĉestra katunaĵo baldaŭ disvendiĝis malmultekoste en ĉiu lando. Ĝi kaŭzis, parenteze, teruran suferadon inter hindiaj ŝpinistoj k teksistoj, el kiuj « la ostoj de miloj » laŭ la angla vicreĝo tiutempa « nun blankiĝas sur la kampoj de Hindio ». Feliĉe la manĉestraj komercistoj prosperegis en vera kapitalista paradizo. « Komercistaj Princoj » abundis, mono fluis ĉie, ĉie, krom en la manojn de la laboristoj. Ĉi tiuj svarmis en la domaĉaroj, kiuj ĉirkaŭas la fabrikojn, vivante kiel bestoj. Manĉestro kreskis kiel vasta vundo trans la kamparo. Stariĝis grandaj varejoj ĝistegmente ŝtopitaj de fabrikaĵo. Sekvis kontoroj, bankoj, maŝinfabrikoj ; troviĝis karbminejoj k baldaŭ ĉio nigriĝis en la fumo de mil kamentuboj. Kvieta observanto de ĉi-tiu floranta kapitalismo estis Frederiko Engels, civitano de Manĉestro k amiko k kunlaboranto de Karlo Marks. Estis Engels, kiu provizis al Marks multan bazan materialon por liaj grandaj verkoj.

Baldaŭ grupiĝis ĉirkaŭ Manĉestro satelitaj urboj, kie fabrikiĝis ĉia ŝtofo, kiun poste oni vendis en la ĉefurbo. En unu el tiuj urboj, Roĉdejl (Rochdale), fondiĝis en tiu tempo la unua Koperativa Asocio en la mondo.

Manĉestro kreskis ; ĝis hodiaŭ ĝi estas la kvara urbo laŭ grando en Anglio, enhavante milionon da loĝantoj. Ĝiaj ĉefstratoj estas larĝaj k imponaj, tamen la laboristaj kvartaloj ankoraŭ portas la stampon de la lastjarcenta kapitalismo. Kvankam la urbo troviĝas 59 kilometrojn de la maro, ĝi estas per kanalo unuigita al la havenoj de la mondo, k estas mem la kvara haveno laŭ gravo de Anglio. Ja estas strange por vizitanto vidi meze de magazenoj k deponejoj la altan fumtubon de oceana transportŝipo. Ĉirkaŭ la dokoj troviĝas multe da vastaj maŝinejoj, inter ili Metro Vickers, mondfamaj armilfabrikistoj, k multaj aliaj ĉiuspecaj firmoj, kie oni fabrikas ĉion ajn, de pinglo ĝis lokomotivo. Krome troviĝas vicoj post vicoj da ŝpinejoj k teksejoj, fondaĵoj de la manĉestra prospero.

Bonŝance por la laboristo troviĝas nur kelkajn kilometrojn de Manĉestro iom de la plej belega kamparo en Britio, kiun vizitanto devus vidi. Apude ankaŭ estas fama marbordurbo, ludejo de la proleto, Blakpulo (Blackpool).

Kiel ĉiuj grandaj urboj, Manĉestro havas belajn parkojn, teatrojn, kinejojn ktp por la distro de sia loĝantaro.

Al Manĉestro, lulilo de la industria revolucio, ni tutkore invitas ĉiun SAT-anon. Venu k vidu proprokule la evoluadon de l'brita kapitalismo k, parenteze dirite, ĝuu la interesplenan programon, kiun ni jam pretigas.

O. K. K.

XVI-a Kongreso de SAT

en Manĉestro (Britio)

2-7. de aŭgusto 1936

Adreso de la O.K.K. :

16 Lily St., Manchester 8.

Komunikoj de la Plenum-Komitato

1. *Kun la venonta n-o ni dissendos la voĉdonilojn por la Referendumo koncerne la kongresproponojn submetotajn al voĉdono.*

2. *K-do Ĝermen, la ĝisnuna prezidanto de la P.-K., eksiĝis el la Komitato, pro mal-interkonsento kun siaj kolegoj de la P.K. en la ĝenerala koncepto pri la taskoj k la rolo de nia Asocio. Dum tiu ĉi monato okazas elekto de anstataŭanta membro, samtempe kun anstataŭanto por la el Parizo foririnta K-do Bubo. Ni informos en la proks. n-o pri la elektitaj K-doj k la redistribuo de l'funkcioj interne de la P.K.*

3. **Ĝis redakto de tiu ĉi komuniko (10. okt.) ni ricevis ankoraŭ nenian informon de la I. P. E.-centro, responde al la letero de la 15-a Kongreso sendita antaŭ pli ol du monatoj[1].** *Raporteton pri la IPE-kongreso, laŭ la sciigoj de niaj tien delegitaj K-doj, oni trovos aliloke en tiu ĉi n-o.*

4. *Ni trovis en la gazetaro jenan noton: « Laŭ dekreto de la ekstera-komerca komisaro, neniu persono loĝanta en Sovetio estonte povos ricevi librojn, revuojn aŭ ĵurnalojn el eks-*

[1] Ĵus, dum la kompostiĝo de tiu ĉi n-ro, alvenas let. de IPE, kies enhavon ni nun ekzamenas.

terlando sen antaŭa permesilo, k tiam nur pere de « Meĵdunarodnaja Kniga » havanta la monopolon super la importo de ĉiu literaturo. Tiu dekreto signifas pli rigoran aplikon de la literatura monopolo k egalas al pliforligo de la cenzuro. » *Sekve de tiu noto ni sendis skribaĵon al la koncerna agentejo, kun la celo ekscii, kiel k laŭ kiu amplekso ni povus eventuale importi en Sovetion SAT-literaturon.*

La morto rabis faman internaciiston

Antaŭ nelonge mortis en Moskvo Henriko Barbus (Henri Barbusse). Lian kadavron oni transportis al Parizo, kie okazis funebra procesio, partoprenita de almenaŭ 100.000 *homoj. Nun ĝi « ripozas pace » en la fama aristokrata*[1] *tombejo Perlaŝez (Père-Lachaise), en aparta, aĉetita tombo, komforte prizorgita.*

Decas tiaokaze, ke ni memorigu nian legantaron pri la opinio de l'fama mortinto, rilate al esp-o ĝenerale k al nia movado aparte. Tiucele ni opinias, ke plej trafa estas la represo de la letero, kiun sendis H Barbus al Lanti, kiu estis petinta, ke li estu la prezidanto de l'fond-kongreso de SAT, en 1921.

Kara Kamarado !

Kun granda ĝojo mi ricevis vian novaĵon pri : kreo de esperantista organizo revolucia. Vi k la homoj, kiuj konceptis k enfaktigas tiun ideon, estas veraj organizantoj k praktikaj efektivigantoj de granda afero. Dank' al vi, pozitiva elemento de logika interfratigo estas metode dissemata k disvastigata. Miaopinie, oni ne povas tro taksi la gravon de tiu iniciato.

Estas necese, ke la Universala Lingvo fakte ekzistu, ĉar ĝi estas, — laŭ malnova figuro, kiu tiaokaze estas treege ĝusta, — unu el la ŝtonoj de la estonta socia konstruo, unu el ĝiaj bazoj mem.

Multaj el niaj K-doj ne komprenas la konstruan valoron de la Universala Lingvo helpa. Priokupite je tujaj malgravaĵoj, iafoje pli ŝajnaj ol realaj, ili ne vidas, ke iu ajn internacia sistemo, por esti fortika k profunda, ĝin bezonas en sia strukturo.

Ĝis nun la Universala Lingvo montriĝis kvazaŭ distrilo, komfortilo ebliganta plifaciligon de interrilatoj inter iuj personoj, iuj grupoj ; ĝi nur ŝajnis faciligilo por komerco, ia elegantaĵo k delikataĵo por intelektuloj, k tia propagando entenis mi ne scias kion supraĵan, aristokratan k monduman. Plejparto el tiuj, kiuj sin dediĉis al ĝia disvastigo, ne difinis al ĝi tre vastan k profundan celon, sed ĝin konsideris kvazaŭ luksan ornamaĵon de la civilizo. Ili faris nur ian kosmopolitaĵon por Universala Ekspozicio.

Nun ili ekvidas la teruran potencon, kiun kaŝenhavas la Universala Lingvo k la grandegan pozitivan kaptecon, kiun ĝi kapablas apliki sur la ideojn, perforte kunigante ĉion, kio estas simila.

La burĝaj k mondumaj esperantistoj estos pli k pli mirigataj k terurigataj de ĉio povanta eliri el tiu talismano : Instrumento donanta al ĉiuj ajn homoj la eblon interkompreniĝi.

La starigo de via internacia Asocio, kiu estiĝas meze de la necertoj k fantaziaĵo de la burĝaj esp-istaj organismoj, signas la novan k definitivan etapon de la ideo. Vi nun staras en vera efektiviĝo k sur la vera kampo, kie vi devis preni lokon.

Kun fervoro mi akceptas la honoron, kiun vi faras al mi metante vian baldaŭan kongreson sub mian prezidon. Treege mi bedaŭras, ke nur per la penso mi ĉeestos, ĉar pro

[1] Tio signifas, ke nur monhavuloj povas tie esti enterigataj, ĉar por akiri terenon, vivlonge devas esti pagataj sumoj.

El la venontjara Kongresurbo



Laboristaj esperantistoj de Manĉestro (Britio) en la Majtaga manifestacio.

(Kliŝo pruntita de "*Daily Herald*").

multaj motivoj mi ne povos partopreni tiun kunvenon. Sed estu konvinkita ke mia simpatio por via afero k por vi mem ne estas supraĵa k vorta : ĉiel laŭeble mi penos por helpi vin.

Kredu, vi k viaj K-doj, je miaj fratece sindonemaj sentoj.

Henriko Barbus (Henri Barbusse).

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj

La 9-a kongreso de Sveda L.E.A.

La jarkongreso de S.L.E.A. okazis, kun pli ol 150 partoprenintoj, la 17-an k 18-an de aŭgusto en *Malmö*, kie la movado havas spertajn k taŭgajn kunlaborantojn. Socialdemokrata partidistrikta prezidanto promesis moralan k ekonomian subtenon. La solena malfermo okazis sabat-vespere kun muzikaj k teatra prezentoj k pluraj paroladetoj. Dimanĉe, en laborkunsido, la jarraporto de la asocio estis unuanime aprobata. Ni citas el ĝi : Nombro da aktivaj membroj por la *tuta* jaro estis en 1931 : 481 ; 1932 : 817 ; 1933 : 1.525 ; 1934 : 1.869. En 1935 por la unua *duonjaro* la nombro estis 1.460 (lastjare 1.612). La nombro da subtenantaj membroj ankaŭ iom malkreskis kompare kun la lasta jaro. La distriktoj ĝenerale bone laboris por la asocio. La gazeto *Sveda Laborista Esperantisto* aperis regule. Eldonkvanto nuntempe : 2.300 ekz-oj. La kasraporto montras havon de 785,46 kronoj (ĉ. 3.000 fr. fr.). La spezaro ampleksis sumon de 15.107,07 kr. (ĉ. 60.000 fr. fr.).

Sekvis raportoj pri la agado en diversaj lokoj. Okazis longa diskuto pri unuecfronta propono de la IPE-grupo en Malmö kun decido, ke la kongreso lasu tiun demandon, ĉar en SLEA jam ekzistas la unuecfronto, pri kiu la IPE-anoj pledis. Ĉe elekto de l'nova Plenum-Komitato okazis kelkaj anstataŭigoj de K-doj ; kiel prezidanto estis reelektata K-do Ernst Eriksson.

Portugala Instituto de Esperanto.

Ĵus aperis la antaŭ-lasta kajero (p. 199-230) de l'« Kompleta Kurso de Esperanto » por portugallingvanoj. Gramatikaj klarigoj, ekzercaro, konversacioj, vortaraj klarigoj estas taŭge aranĝitaj k trafe elektitaj. En tiu ĉi lasta kajero la eldonintoj (*P.I. de E.*, adreso : Rua do Jardim do Regedor, 5-4°, *Lisbono*) vaste reklamas por SAT k ĝiaj eldonaĵoj, ankaŭ por la « Plena Vortaro ». Eĉ la librokatalogo de SAT trovis lokon sur la kovrilo. Por la disvastigo de nia movado en Portugalio certe tiu nova instruilo havas grandan signifon. Ofte ja de bona instruilo dependas la progreso de la movado. La Instituto havas disvastigan teritorion ankaŭ en Afriko (portugalaj kolonioj), k eĉ tie kelkaj esperantistoj jam estas anoj de SAT.

EL NIA LETERUJO

... En Aŭstrio oni ĝenerale sin esprimas pli libere ol en Hitlerio. Tamen, kiom ankaŭ tie ŝanĝiĝis ! Iamaj plej fervoraj funkciuloj el la soc. dem. partio tuj aniĝis la patriotan fronton k laboristoj, kiuj sin neniam montris politike fervoraj, montriĝis nun plej klaskonsciaj ! El ĉies buŝo aŭdiĝis mizero k malesperemo... Oni ĉie sentas la premon, kiu kuŝas sur ĉiuj. Antaŭ ol iu ekparolas, oni min demande, esplore rigardis por kvazaŭ demandi : « ĉu mi povas konfidi al vi mian malkontenton, ribelemon ? » La lab. esp-istoj, kiujn mi renkontis (en mia naskiĝloko 6) nenion faras por esp-o. Ili estas pli malunuecaj ol iam. En alia urbeto mi renkontis SAT-anon, fervojiston, kiu sin montris persista k konscia pri la laboro farenda por nia afero... Klare evidentiĝas, ke la mizero tute ne estas nepra instigilo (kiel multaj kredas), por ke la laboristaro kapablu trovi sian unuecon. Neniam regis inter ili pli da perfido, flatemo al subpremantoj, mallaboremo por liberig-movado ktp. Multegaj ricevas nenian subvencion k paroli pri laboreblo sonas al ĉiu ironio, absurdo ! Kio min tuj frapis, estis, ke multaj proletoj portas la nacian kostumon, laŭ registara rekomendo, por aspekti vere aŭstraj ; tio estis malpli antaŭe... Oni esperas reĝimŝanĝon ajnan, sed ĉe *neniu* mi trovis komprenon, ke nepre necesas kunlaboro kun la alilanda laboristaro, por ke pliboniĝo de la vivo ebliĝu... Okaze de la datreveno de la morto de Dolfus ĉiuj devis bruligi en la fenestro du kandelojn ; kiuj ne faris tion, estis notataj. La hitleranoj bruligis hokokrucojn sur la montoj...

H. B.

Ŝanĝo de organizformo kaj ...?

Oni memoras, ke la neŭtrala esperanto-movado dum la lastaj jaroj decidis ŝanĝon de sia organizo tutmonda ; post kelkjara klopodado la reprezentantoj de diversaj landaj asocioj sukcesis meti je la loko de la supernacieca U.E.A. kun individuaj aliĝoj specon de Internacio bazita sur la kolektiva aliĝo de landaj asocioj. ISE-anoj k IPE-anoj en tiu momento argumentis kun triumfa mieno, ke eĉ U.E.A. estas devigata alpreni la *internaciecan* organiz-sistemon, ĉar la supernacia strukturo, laŭ kiu ĝi funkciis ĝis tiam, montriĝis maltaŭga...

Nu, ne ankoraŭ longan tempon daŭris la eksperimento, k jam oni povas legi en « Heroldo », el la plumo de T. Jung, ke « UEA perdis *la duonon* de la aktivaj membroj ; parte influo de la ankoraŭ progresinta krizo, *parte influo de la « reorganizo »* (Niaj substrekoj. — *Red.*) ».

Sajnas, ke tiu fakto devus meditigi ĉiujn en nia lab. esp. movado, kiuj tiom fervore emas pledi por internacieca strukturo k kontraŭ la nuna k ĉiama strukturo sennacieca de SAT...

POR ŜTOPI LA BREĈON

38. *Listo.*

K-dino L.	fr. fr.	135.50
K-do L.	»	20.—
R. Fischinger, Hago	»	7.—
Eriksson, Stokholmo	»	44.—
J. Radiguet, Papeete	»	5.—
G. Farnier, Bois-Colombes	»	30.—
K-dino Campbell, Dunferml ...	ŝil.	4.—

Kompletigoj k ĝustigoj al la Kongresa Protokolaro

Oni korektu en la paroladoj de K-do *Pâris* jenon : (p. 70, 2-a kol.) aldonu : « Iam la komunistoj uzis trompajn akuzojn por malhelpi la elekton de alitendencaj kontraŭfaŝ. kandidatoj, tiel favorante la elekton de faŝistoj... » ; (p. 71) « mi dubas, ĉu inter la cent mil membroj de la franca soc. partio *eĉ ankoraŭ unu* (anst. *multaj*) povus aprobi tion, kion diris sveda soc. K-do Eriksson kontraŭ la eblon pri komun-agado kun la kom-istoj (— ne pri « sennac. strukturo ») ; (p. 72) « ... en FEO la *preskaŭ tuta* (anst. *tuta*) belga sekcio, k en Nederlando *la plimulto* (anstataŭ tuto) » ; (p. 73, 2-a kol.) « tiu taktiko neniel *sukcesis* » (anst. *necesis*) — Aŭderaro mia ! *Bart.* (Samloke) Antaŭ « oni ne devas liveri al la IPE-gvidantoj pretekston por rifuzo » aldoni : « Oni devas plifaciligi al ili la vojon al tiu reunuigo, se, kiel mi esperas, ili komprenas ĝiajn neceson k eblon. » (p. 74) La deklaro de K-do *Robert* estis sekvo de intervoko de tiu K-do k tiurilata respondo de Pâris ; *Pâris* al tio diris, ke li ne volas respondi al plurfojaj atakoj kontraŭ li direktitaj ekster la temo, kvankam li konsideras ilin malobjektivaj. (p. 74) Rilate proponon de K-do *Vrees* pri kongreskotizo K-do Pâris faris kompletigan aldonon (akceptitan principe), ke la diferenco inter la kotizoj de gastoj k SAT-anoj ne superu duonon de tiu lasta k ne pagiĝu de senlaboruloj.

K-do *Joan* petas forstreki sur p. 74, 1-a kol., 16-a linio, la vorteton « ne ». Sekve la teksto estu legata : « Li tamen kredas, ke baldaŭ ili eniros... » ktp.

La nomo de l'K-do (sur p. 74), kiu subtenis la okazigon de l'Manĉestra kongreso, estas K-do *Sugar* (k ne *Jordaan*).

Bartelmes.

SENNACIECA REVUO

Monata revuo soci-politika k literatur-scienca

16 paĝoj. Ponumera prezo : 2.25 fr. fr.

El la enhavo de l'oktobra kajero : Ĉu la leĝo de l'pli forta estas natura leĝo ? Leteroj el Jugoslavio, Polio, Norvegio, Svisio, Ĉinio, k.a. Diskutejo. Soci-politika panoramo. Ampleksa belliteratura parto. Scienco. — Sub la Sagoj de l'Kritiko.

ĈE LA KONTRAŬULOJ

Sub titolo : La lingvo de sennaciuloj. Esperanto de Marks, mi trovis artikolon en la gazeto « Volk en Vaderland » (Popolo k Patrio), organo de l'nederlanda faŝista partio. Kun mirego mi eksciis per ĝi, ke mi.. lernis lingvon de Marks. Mi supozadis Zamenhof'on aŭtoro de esperanto, sed homo ja povas erari. Post insultoj al la socialdemokrata partio (S.D.A.P.) sekvas jenaj senbazaj imputoj al F.L.E. : « *Unu el la multaj kromorganizoj de la S.D.A.P. estas la organizo de laboristaj esp-istoj.* » Sed en ties statuto troviĝas jena regulo : La Federacio agnoskas la klasbatalon, sed rilate la diversajn direktojn en la lab. movado, ĝi estas neŭtrala. Mi citu plue la faŝistan gazeton : « *Krom ĉi tiu organizo ankaŭ la laŭŝajne nepolitika gazeto « Wij » (Ni) regule propagandas esp-on, dum ĉe multnombraj okazoj esp-o estas propagandata de social-demokratoj. Kio estas la celo de ĉi ĉio ? Tio evidentiĝas el la titoloj de la organoj de SAT... Ĉi tiuj gazetoj ja nomiĝas « Sennaciulo » « Senn-Revuo »* (Sekvas la traduko de ambaŭ nomoj). « *La marksismo rigardas esp-on unu el la rimedoj, per kiuj la nacia popolkomuno de interne povas esti detruata. Pro tio, ke socialdemokratoj, komunistoj k ĉiuj, fremdiĝintaj pri propraj popolo k kulturo, tiom fervoradas por ĝi, esp-o estas plura paŝo al detruado de l'okcident-eŭropa kulturo k krome al diktatoreco de areto da sennaciecaj marksistoj super la popoloj.* » Ĉu necesas komenti ? Mi kredas, ke ne. Tamen forte min ĉagrenas la fakto, ke nekonsciaj klasfratoj troviĝas en tiaj faŝ. organizoj. Nia tasko estas diskuti kun ili k elmontri la mensogojn. Ni provu savi k eduki tiujn el ili, kiuj ne perdis ankoraŭ plene la racion.

Ŝvarc (17858).

Kiel oni malhelpas esperanton en Germanio

Ni ricevis de unu el niaj germanaj amikoj ekzempleron de antisemita semajna gazeto (« Judenkenner », n-o de 21.8.35), en kiu iu T.K. el Bremen aperigis artikolon pri « Esperanto-kongresoj ». La aŭtoro, asertinte, ke en Romo ĉe la universala kongreso de esperanto kuniĝis « la judoj k framasonoj el la tuta mondo kune kun multnombraj kunsekvantoj, kiuj neniam elĉerpiĝas » por revui siajn fortojn, citas kelkajn tekstojn el paroladoj faritaj ĉe la tri unuaj universalaj esp.-kongresoj, por konkludi laŭ la maniero de l' plej puraj arjoj en Germanio, ke la esperantistoj estas krimuloj, ĉar ili celas « interfratiĝon de l'homaro, forigon de l'apartiĝo de la homaro en diversajn popolojn ». Poste la verkinto plendas, ke antaŭ la mondmilito « la esperantismo estis uzata kiel batalilo, kun la tasko plifortigi la pacisman ondegon k per tio malfortigi la batalvolon de la Centraj potencoj (Mezeŭropo) ». Menciinte, ke en Romo la judino Zamenhof faris lekcion pri la Bahai-filozofio, « do doktrino, kiu celas la ' unuigon de ĉiuj rasoj ', la popolaran kaĉon », T.K. konkludas (k tiun konkludon la nomita gazeto aperigis graslitere) : « Pro la Oriento iam Romo pereis. Se la faŝista Italio disponigas al la orienta spirito la roman forumon, la roman universitaton, k al ĝi tiel ebligas senekzemplan sukceson, tio estas ĝia propra afero. Sed al ni ne povas esti indiferente, ĉu germanaj civitanoj pretas kontribui al tiu ĉi triumfo de l'judismo, eĉ ĝin igas vere perfekta, metante (tute laŭlitere !) la flagon de nia Tria Regno nekonscie en la servon de superŝtataj potencoj. *Videant consules...* ! »

Ni ne scias, ĉu la gazetaĉo, kiu akceptis tiun ĉi artikolon, estas multe legata eĉ en Hitlerio... tamen la spirito, kiun ĝi haladzas, estas tiu oficiale propagandata de la registaro. La malkaŝa minaco en la lasta frazo montras plian fojon, ke hodiaŭ jam la nura fakto esti *esperantisto* en la regno de Hitler povas igi suspektinda personon k havigi al ĝi rajton al la martira krono.

Al kontraŭulo de Esperanto

Intelektulo, kiu polemikas pri kulturo k progreso, devas scii, ke la gravaj verkoj de literaturo, arto k scienco estas ĉiam universale kreitaj. Bethoven ne komponis germanajn simfoniojn ; Ŝekspir (Shakespeare) ne verkis anglan Hamleton ; k la scienculoj ne elfaris patriotan biologion aŭ ŝovinistan astronomion. Ĉiuj geniuloj aldonis pluson al la ĝenerala kulturo per siaj individuaj kapabloj aŭ talentoj. Certe esperanto ne povas difekti kulturon, kiu per si mem estas universala.

Ŝajnas, ke ĉiuj mokuloj pri la lingvo esperanto nek studas ĝian valoron nek komprenas la celon. Iliaj kritikoj klare montras tion... Tuj ili demandas : Ĉu vi volas transformadi la homaron en unu soldataron ? Ĉu vi volas malaperigi la belon k sankton de ĉiu kulturverkado ? Ĉu vi volas... ktp ? Mirige estas nur, ke oni ne akuzas nin proponi verdkoloran naskotaron. Laŭ iliaj esprimoj oni eĉ povus kulpigi nin pri kanibalismo — per la pretendo, ke ni proponas... forigi malfratecon k malamikecon.

Verdire, mi suspektas ĉiujn kontraŭulojn de esperanto je ŝovinistaj aŭ rasistaj motivoj. Se ili estus sinceruloj, ili komprenus, ke nia celo ne estas politika aŭ detrua aŭ aneksa afero... Nia ĉefa ideo estas unuigi, interfratigi la homaron per unu komuna lingvo...

Samuel Polinov, Filadelfio.

Mi petas parolpermeson ...

Leginte la protokolaron pri la XV-a kongreso k leterojn de kelkaj Ge-kdoj, kiuj opiniis utile skribi al mi demande pri mia « stranga » konduto, okaze de l'kongreso, mi deziras doni publike kelkajn koncizajn klarigojn.

Kvankam havante la fidon de la granda plimulto de la SAT-anaro, mi tamen eksiĝis el la P.K. de nia organizo (en sept. 1933), tial ke mi nepre ne volis, ke mia persono estu ia malhelpilo por la reunuiĝo de nia movado. Pro la sama motivo mi ne veturis al Valencio, lastan jaron, k decidis ne ĉeesti nunjare la Parizan Kongreson. Se tamen mi suriris dum kelkaj minutoj la podion de l'kongressalono, tion mi faris pro jena motivo : Veninte iom tro frue en la kongresejon por ĉeesti la kunsidon de la Sennaciista Frakcio, *mi sidis lastvice en angulo k tute ne intencis interveni en la debaton. Sed iu K-do sciigis al mi, ke flugfolioj*[1] *estas disdonataj, per kiuj estas dirite al la kongresantoj, ke mia foresto signifas ke mi « hontas », ke mia « konscienco estas maltrankvila » ktp. Pro tio mi do decidis kapti la okazon eldiri kelkajn vortojn k tiel pruvi, ke mi povas rekte rigardi en la vizaĝon de kiu ajn.*

Eble tamen estus preferinde, se mi lasus supozi, ke fakte mi hontas stari antaŭ la kongresantaro. Pri tio mi mem ne povas tute objektive juĝi. Sed almenaŭ restas la fakto, ke vole, nevole mia persono ne povas esti ignorata, kiel mi deziras. Kion ajn mi faru aŭ ne faru, *troviĝas homoj por ĵeti al mi koton. Nu, tiun delikatan taskon ili do plenumu daŭre ĝis elĉerpiĝo de siaj fortoj !... Mi hardiĝis tiurilate k insultoj de iaj personoj efikas al mi kvazaŭ laŭdoj. Ne povas vundi kiu ajn eĉ per plej krudaj vortoj. Sed mi volas simple deklari publike, ke ĝis la faŝismo diverskolora ne estos venkinta en la tuta mondo, mi eldiros*

[1] Tiuj folioj surhavis jenan tekston : « Ĉu vi ne miras pri la sinteno de Lanti, kiu ne kuraĝis partopreni la kongreson, loĝante en Parizo mem k fartante pli bone ol multaj el vi, kiuj piede k malsate penis atingi la kongreson de tiom malproksime por la idealo, kiun Lanti mem semas ?

« Se lia konscienco estus trankvila antaŭ ĉiuj k-doj, li certe venus por kontentigi la deziron de l'kongreso, sed bedaŭrinde por li, li ne kuraĝas respondeci pri la konsekvenco de siaj intrigoj. Jen kial li ne kuraĝas veni !!! Li hontas !!!!!! »

plume k lange kion mi opinias vera, ĝusta k diskoniginda...

En « Absolutismo » mi jam diris, ke la homaro tendencas refali en ian mezepokon. Bedaŭrinde mi ne eraris: pli k pli da signoj montras la pravon de tiu diro. Eĉ en nia movado troviĝas homoj, kiuj sekrete bedaŭras ne havi la eblon malebligi, ke ekster *SAT, sub mia propra respondeco, per miaj propraj rimedoj k tiuj de miaj amikoj, mi eldiru herezaĵojn. Ĉe tia konstato iafoje mi preskaŭ emas kredi pri sonĝo. Tamen estas realaĵo. Al tiuj absolutuloj mi eldiras ĉi tie, ke mi elbatalos mian rajton herezi laŭplaĉe, ĝis ili havos la povon faŝistece silentigi min...*

E. Lanti.

Frakcia Vivo

Komunikoj de la Socialista Frakcio.

Ni interkonsentis okaze de la nunjara SAT-Kongreso pri jeno:

1) La Frakcio estos titolita « TUTMONDA SOCIALIST-ESPERANTISTA FRAKCIO el SAT- k LEA-anoj ». Estos *plenrajte* anoj de ĝi ĉiuj anoj de SAT, de la LEA-oj k grupoj, kiuj subtenas SAT, apartenantaj aliflanke al organizoj (partioj, sindikatoj, junularoj, ktp) de la Dua Internacio.

2) Mi restos sekretario; mi profitos, ke mi estas liberigita de pluraj gravaj malhelpoj, por organizi regulan laboradon de la Fr. La anoj de la Fr. en Amsterdamo elektos Konflikt- k Kontrol-Komisionon.

3) Referendumo estos organizita pri la regularo de la Fr. Por certigi la gvidadon de la Frakcio per tiuj inter ĝiaj anoj, kiuj fakte interesiĝas al ĝia vivo, rajtos partopreni la referendumojn k voĉdonojn en la jara Fr.-kunsido nur la aktivaj anoj abonintaj « SOCIALISMO »-n. Ĉiuj anoj tamen havas propon- k diskut-rajton; SAT- k LEA-anoj povos kunveni aparte; regionaj k landaj sekcioj de la Fr. povos esti konsistigataj, k ĉiuj aktivaj soc-istaj SAT-aŭ LEA-anoj rajtos fiksi ilian regularon k laboron. Simpatiantoj, ankaŭ organizoj estas petataj aliĝi kiel *subtenantoj*.

Alvokoj.

1) Ni petas de la jam *pluraj miloj* da Frakcianoj, ke ili nepre partoprenu la laboron.

2) *Ni bezonas* kandidatiĝon de du *helpsekretarioj*, de landaj k regionaj *sekretarioj k perantoj*, de *delegitoj* de la Fr. ĉe soc. organizoj.

3) Por ebligi *eldonon de Soc. Literaturo*, ni alvokas al tradukontoj, ĉu de tuta verko el socista aŭtoro, ĉu almenaŭ de karakterizaj partoj el verkoj por « Soc. Antologio ». Kiu sin proponas? Ĉu iu kapablas eĉ fari originalan verkon?

4) *Nia organo* « SOCIALISMO » estas sendita al ĉiuj mendintoj. Okaze de nericevo oni avertu. Ni bezonas nepre multajn abonantojn k ankaŭ kunlaborantojn. Specimeno senpaga al ĉiuj mendintoj. Abono al 6 n-oj : 3 fr. fr. (2 respkuponoj, aŭ samvaloraj *vialandaj* PM).

5) *Referendumon pri la regularo* ni preparos per publikigo de ĉiuj ŝanĝproponoj je la proponita teksto, kiujn ni ricevos de Frakcianoj antaŭ la 25-a de novembro.

PRI KIO AJN, TUJ SKRIBU! KUNLABORU!

A. Pâris, 6 Villa Sabot, Malakoff, Seine (Francio).

Eldonkvanto : 5.300 ekz.

Komuniko de Bolenfrasat.

La principdeklaro de la Laborista partio en Usono

estas la nomo de la tria kajero de LA PERMANENTA REVOLUCIO, aperinta en septembro. Tiu deklaro estas facile komprenebla dokumento pri bolŝevismoleninismo.

Kritiko pri la Sepa mondkongreso de Kominterno

aperos kiel oktobra kajero de LA PERM. REVOLUCIO. Mendu tuj! La broŝuro aperas en pli granda ol kutima eldonkvanto pro la gravo de la temo. La enhavo estas interesa kritiko pri la paroladoj k decidoj de la Sepa Komintern-kongreso.

Aliaj broŝuroj haveblaj ĉe ni:

La fundamentaj principoj de la Kvara internacio. Unua kajero de LA PERM. REVOLUCIO. Enhavo : El deklaro de la bolŝevist-leninistoj, 11 programtezoj, ktp. — La politika situacio en Ĉinio. Dua kajero de LA PERM. REVOLUCIO. Artikoloj pri Kuomintang, Kominterno, ĉinia Kom-partio, kamparana milito ktp. Prezo : 1 intern. respondkupono po ekz. aŭ 29 danaj oeroj aŭ egalvaloro.

Grava internacia alvoko por la Kvara internacio !

La int. sekretario de la internacia komunista ligo, la revolucia socialista lab. partio en Nederlando. La lab. partio en Kanadio, la lab. partio en Usono k la grupo bolŝevistleninista en SFIO en Francio subkribis alvokon al formiĝo de nova internacia prolet-organizo — la Kvara internacio.

La alvoko estas havebla de ni senkoste en esp. lingvo. Speciale ni petas la K-dojn de la Sennaciista Frakcio, sciigi al ni sian opinion pri ĝi. *Adreso:* BOLENFRASAT pere de SAU, DANIO, Kopenhago F, Duevej 120. Oni sendu monon nur al POUL MOTH (sama adreso).

19381.

PRI LA SENNACIISTA FRAKCIO

Ni ricevis raporton pri la kunsido de la S.F., okazinta dum la SAT-Kongreso. Pro la amplekso de tiu protokolo k ankaŭ pro tio, ke ĝia enhavo povus veki indignon ĉe pluraj ortodoksemaj legantoj, ni decidis ne publikigi tiun dokumenton. Espereble la sennaciistoj komprenos, ke nian decidon diktas nur la deziro eviti disputojn en nia sentendenca organizo.

Oni povas bedaŭri, ke homoj ĝenerale ne kapablas toleri opiniojn, kiuj tro draste kontrastas kun iliaj propraj. Sed dume ni devas atenti realaĵon k ne dezirindaĵon.

El la ricevita raporto ni simple sciigas, ke en la III-a n-ro de HEREZULO troviĝas la tuta protokolo pri la koncerna kunsido. Tiu n-ro estas 20-paĝa, ilustrita k havebla ĉe la sidejo de la revuo. Interesiĝantoj bonvolu do sin turni al : *Esperanto*, 14, avenue de Corbéra, *Paris* (XII), sendante 1 internacian respondkuponon.

Red.

Pri la 2-a IPE-Kongreso (Antverpeno),

kiu okazis de 10.-12. aŭg., ni ricevis komunan raporton de la tri SAT-delegitoj, krome de Antverpena K-do (NFLE-ano), kiu estis prezidanto de la IPE-kongreskomitato, sed propravole antaŭ la kongreso eksiĝis el IPE, 1) pro presigo de « Sur Posteno » en Antverpeno ; 2) pro invito de la OKK-sekretario Van Dooren al li, en publika parolado « ne rekte, sed *ruze* ataki SAT ». (Nia informanto lojale proponis por la « verda monato » (sept. 1934) al ĉiuj antverpenaj lab. esp-istoj unuecfronton en la propagando, k tiu propono estis akceptita de la regiona F.L.E. kongreso.)

Laŭ la raportoj ni konkludas, ke la kongreskunsidojn partoprenis ĉ. 15-20 delegitoj k 15-20 gastoj (!), dum laŭ IPE-a fonto ĉ. 90 personoj ĉeestis la kongreson (k 127 aliĝis)[1]. *Neniu delegito el Sovetio ĉeestis*, kiu fakto elvokis sufiĉe amarajn rimarkigojn. Du el la SAT-delegitoj parolis k estigis pri la IPE-statuto (punkto pri la dialektika materialismo) debaton, dum kiu IPE-delegitoj embarasite asertis, ke tiurilate la statuto ne trovas praktike aplikon. La kongreso decidis deklari sin nekompetenta ŝanĝi la statuton. Estis proponita respondo al la letero de SAT, kiu servu kiel intertraktobazo al trikapa komisiono (el francaj K-doj) starigita por interrilati kun la Plenumkomitato de SAT.

P. K.

EN NIA MOVADO
(KRONIKO)

Argentinio. Post kunvenoj okazintaj en Buenos-Aires la 7. julio k 25. aŭgusto, en ĉeesto de la SAT-anoj urbaj k ĉirkaŭurbaj k kelkaj novaj simpatiantoj, oni decidis la fondon de « SAT-amika Rondo » kin laboros laŭ la SAT-statuto, disvendos SAT eldonaĵojn tra la lando, helpos la ĝeneralan peradon de SAT k propagandos esp-on en lab. medioj. Al enlandaj K-doj estas sendita varbcirkulero. La Rondo decidis tre aktive partopreni en la agado de nia Asocio k subteni ĝin morale k materie. (Ni gratulas k deziras longan vivon al la novnaskito! *Red.*)

Nederlando. La *Haga* SAT-Rondo atentigas, ke la ne sufiĉe bona vizito al la monataj kunvenoj de la Rondo ne estas proporcia al la kresko de la SAT-anaro en la loko. Krome ankaŭ ne-SAT-anoj estas aparte invititaj k bonvenaj en la SAT-rondaj kunvenoj. Ne sufiĉas esti ano de nacia organizo (LEA), ĉar ne pro tio oni lernis esp-on. La celo estas apliki esp-on en internacia kadro. k por tion realigi ekzistas SAT. Tial la grupaj perantoj de tempo al tempo instigu en la grupaj konversacioj al SAT-aniĝo. La kotizon oni povas pagi po 8 (kun « S.R. ») aŭ 3 cendoj semajne al la grupaj kasistoj. *Schwartz.*

FAKA MOVADO

Transportlaboristoj, anoj de I.F.E.T.T.,

kunvenis en Kopenhago okaze de la ITF-kongreso, en la dana parlamentejo, la 20-an de aŭgusto. 20 partoprenantoj el 4 landoj (Holando, Svedio, Svisio k Norvegio). K-do Eijkenaar (Amsterd.) parolis pri principoj k celoj de IFETT, kiu ne estas *nur*-esperantista movado, sed parto de sindikata movado. En tiu senco la konferenceto esprimis per rezolucio dankon al ITF pro ĝia subteno al esp-o. Propono de norvegaj K-doj starigi novan Lab. Esp. Internacion en la kadro de la Laborista Internacio, estis malakceptata per 13 kontraŭ 3 voĉoj (2 sindetenoj). La internacia oficejo (en Holando) estis aklame reelektata.

RADIO-PROGRAMO

Hilversum (V.A.R.A.) disaŭdigas en kunlaboro kun Ned. Fed. de Lab. Esperantistoj, laŭ Amsterd. tempkalkulo la

26.10. (18.30-19.00 h) paroladon de K-do Damsteeg k priesp. komunikojn ;

9.11. (samhore), paroladon de K-do Krijt, kunfondinto de V.A.R.A. ;

23.11 (samhore) kantojn en esp-o.

Raportojn sendu al F.L.E. (radio) Postbus W. 6, *Amsterdam-W.*

Minsk dissendas esp-lingve (de 20.55-21.10, MET) la 3, 6, 9, 12, 15, 18, 21, 24, 27, 30-an de ĉiu monato.

---

[1] La gazeto de l'franca IPE-sekcio tre honteme tute prisilentas la nombron de ĉeestintoj en sia raporto.

PROTESTO

Kelkajn monatojn antaŭ la 15-a SAT-kongreso troviĝis en « S-ulo » komuniko menci-anta, ke « antaŭ la ĉi-jara SAT-kongreso okazos t.n. Somerlernejo. Tiu nova SAT-entrepreno kun instrua karaktero okazos verŝajne de la 23-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Pli detalaj informoj aperos en sekvontaj n-roj. »

Tiu komuniko instigis min provizore forlasi mian planon viziti la Ĉe-instituton en mia lando por eventuale partopreni la Somerlernejon de SAT, kies ano mi estas. Mi do bone atentis la koncernajn komunikojn en « S-ulo », sed, ĉar ili ne detale k klare informis pri la entrepreno, mi skribis al SAT, el kiu mi ricevis respondon tiel optimisman, ke mi tute ne plu atentis la fakton, ke la partopreno al la apudpariza somer-lernejo por mi, kiel nederlandano, estos sendube pli multekosta ol la vizito al la apuda Ĉe-instit-uto.

Post legado de l' sekvontaj linioj, kiuj tiel loge prezentas la aferon, mi ne plu hezitis : « La bona okazado de tiuj kursoj estos garantiita per partoprenado multnombra de geinstruistoj (profesiaj), kiuj en Francio libertempas ekde la 15. julio k kiuj sekve oportune povos partopreni en la aranĝoj k dediĉi siajn fortojn. Ĝis nun esence estas antaŭviditaj kursoj pri esperanto-logio — do io simila, kio okazas en Arnhemo flanke de la Ĉe-instituto. » Kaj poste : « Vi povas esti certa, ke la lernejo okazos. Ne forgesu tamen varbi ankaŭ por ĝi viaflanke en la de vi atingebla medio de esp. fervojistoj, por ke la partopreno estu vere impona. B. v. de nun skribi al la organizanto koncerne tiun aferon. »

La nederlanda FLE sukcesis ĉe la Direkcio de la ned. fervojaro havigi 4 tagojn da ekstra liber-tempo al tiuj fervojistoj, kiuj deziros partopreni la somerlernejon. En la klubgazeto de fervojistaj esp-istoj mi instigis al partopreno. Tamen en « S-ulo » (julio) mi legis nur : « La okazigo de la somerlernejo (kun kursoj, ludo, kc.) estas gar-antiita. Ĝi okazos de la 23-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto en la belpejzaĝa apudpariza urbeto Suresnes en proksimo de la Sen-rivero. La urb-estro de la loko donis la permeson. »

Ankaŭ ĉi lasta informo tute ne estas detala. Mi do skribis al la organizanto k petis respondon al kelkaj demandoj. Mi atendis la respondon dum pli ol 3 semajnoj, sed vane !! Mi tre bedaŭ-ris tion, sed tamen vojaĝis Parizon. Unue mi vizitis la SAT-sidejon, kie montriĝis ke la organ-izanto unu semajnon antaŭe ŝanĝis la lokon de Suresnes al Boulogne. Tie mi ne tuj trovis la organizanton, ĉar la lernejo ne jam funkciis, kvankam estis jam la dua tago. Mi nur renkontis nederl. K-dinon k danan K-don, kiuj kune formis la tutan partoprenontaron. La dana K-do furiozis, ĉar li forlasis la Ĉe-instituton por partopreni la lernejon de la propra movado. Je la 13-a h. venis la organizanto ; li montriĝis esti tute sola el la multnombraj francaj geinstru-istoj (profesiaj). Li trankvilige diris, ke eble morgaŭ venos multaj francaj Gek-doj k certigis al mi, ke tiam la lernejo ekfunkcios, eĉ se ne venos aliaj. Mi do restis, tamen riproĉis lin, ke li tute ne respondis mian leteron. Lia elturniĝo estis tiel infana, ke mi ne ripetos ĝin ĉi tie.

La sekvontan matenon venis efektive du francaj K-doj, kiuj antaŭ 8 monatoj eklernis esp-on. Do la lernejo povis komenĉiĝi. La temo, kiun ni pritraktis, estis, « La nacia defendo », temo kompreneble tro malfacila por komencant-oj.

Tagmeze ni ekskursis k almenaŭ tiuj ekskursoj tre plaĉis al mi same kiel la sekvontaj ekskursoj. Tamen kompreninte, ke tute ne venos la francaj geinstruistoj, mi forlasis la lernejon k intencis reveturi Amsterdamon.

Antaŭe mi protestis ĉe la SAT-sidejo kontraŭ la lernejo, k post interkonsiliĝo kun K-do Ĝer-men mi decidis resti en Parizo ĝis post la kongr-eso. Tiun decidon mi tute ne bedaŭras, ĉar K-do Ĝ. helpis min ĉiamaniere k mi travivis vere agrablan tempon en Parizo.

Tamen mi aŭdigas proteston kontraŭ tia fuŝ-organizo, ĉar kelkfoje ripetita ĝi certe funde detruos la kredon k fidon en la SAT-entreprenoj.

Ke la tuta afero estis fuŝe organizita, montriĝu el frazo, troviĝanta en flugfolieto pri la lernejo, kiun oni sendis al la parizaj esp-istoj : « La progr-amon la partoprenantoj fiksos mem », k; kvankam en nia SAT-movado estas sufiĉe da eminentaj esp-istoj, kapablaj instrui, la organizanto mem intencis esti la nura instruanto. Krome oni eĉ ne menciis, kie k ĝis kiam la partoprenontoj povos aliĝi. La organizinto eble diros, ke la manko de partoprenintoj ne estas lia kulpo. Tamen estis lia devo sufiĉe frue sciigi tiun fakton en « S-ulo », por ke ne viktimiĝu kelkaj eksterlandanoj.

Al SAT mi riproĉas ke oni konfidis la organiz-adon de la afero al K-do, kiu tute ne havas la kapablon aŭ la emon serioze plenumi tiun tas-kon ; kiu eĉ ne respondas demandleterojn. Se oni volas, ke la anoj konservu sian kredon k fidon en SAT, oni ne donu la organizadon de la SAT-entreprenoj en manojn de K-doj, kiuj bone scias paroli k diskuti sed kiuj funde detruos la tutan movadon per sia « organizado ».

Ŝajnas al mi, ke SAT povus havi klerigan instituton superantan eĉ la Ĉe-instituton en Arnhemo, ĉar en nia movado estas sufiĉe da eminentaj instruantoj, dum en A. nur la pastro Ĉe instruas.

Sed antaŭ ĉio necesas bona organizado.

SAT-ano 18 859.

Respondo de K-do Pâris, organizinto de la Antaŭkongresa Lernejo, al K-dino Buis

K-dino Buis, en n-o 433, esprimis la opinion, ke la « facilanima Parizano », kiu estas mi, mal-zorgis « ĉiun ajn organizon » (!) de la Somerlern-ejo, ke mi « tute ne » (!) pensis al la necesaj aranĝoj k zorgis pri « nenio » alia... ol la loko ! Centope, la kongresintoj povis sperti, ke mi senĉese detale zorgis pri plej div. aranĝoj. La lernejanoj mem certe memoras, ke *mi estis senĉese sur la breĉo* por havigi al ili laŭeble ĉion utilan.

Ni devus « jam tre frue en la jaro... anonci lokon, paroladontojn, temojn k literaturon » ? Sed pri literaturo necesis nenio miascie ? La regionon k poste la elektitan lokon ni anoncis sufiĉe frue (jam mi diris, kial ni devis ŝanĝi ĝin).

Rilate paroladontojn, mi disponis pri kelkaj, kiujn mi ne venigis pro la necerta ĉeesto de aŭskultontoj. Mi mem k aliaj partoprenantoj devus kompletigi tiun areton. Cetere, ne necesis multaj, k oni miaopinie *ne devis* antaŭfiksi la temojn (sekve ne anonci ilin), ĉar mi tute ne celis organizi (kiel oni tro ĝenerale faras) « lern-ejon » imitantan la burĝajn, kun paroladontoj « brilegaj » k... *pasivaj aŭskultantoj*, sed mi volis, en diskutoj gvidataj laŭ *sokrata metodo* priekzam-enigi gravajn temojn *laŭplaĉe elektitajn de la partoprenantoj mem*, ĉar mi spertis, ke nur per tiu metodo oni povas objektive k ĝisfunde ekzameni tiajn temojn ; ankaŭ nur tiel ni povis havigi al ĉiuj la eblon ekzerciĝi en esp. parolo. Sekve temas tiurilate ne pri malzorgo, sed pri alia koncepto de la gvidado.

Ne utilas respondi pri bagateloj (ekz. pri la prezo de restado, *la sama* kiel tiu anoncita pri la kongreso).

Eraro estis, ke mi ne « postulis », ke la parto-prenontoj anoncu sin sufiĉe frue. Sed ĉu tio eĉ certigus, ke ili venos akurate k ne pensos ĉefe pri ripozo k ekskurso, kiel dekoj da K-doj ven-intaj dum la dua semajno ?

Pri aliaj instruoj de tiu *sperto* mi faros rapor-ton por estontaj organizantoj. Espereble ili ĝuos pli da dankemo pro la farita laboro...

Pri la gvidkoncepto de K-do P. bedaŭrinde nek la OKK-anoj nek la partoprenontoj estis informitaj de la organizanto, kiu transprenis persone la plenan respondecon *pri la funkciigo de la Somerlernejo. Kaj ĝuste tiu* ne-*informado estis ja la ĉefa organiza manko de l'entrepreno ; tion montras ĉi-supra protesto k ankaŭ la skribaĵo de K-dino Buis.*

Red.

MEMORNOTO

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *Signalen*, Stokh., 8., 15., 22., 29.8., 5., 12., 19., 26.9., 3.10. ; *Arbetaren*, Stockh., 9., 13., 16.8. 10., 11.9., 4.10. ; *Renobasion*, Mexico, 13.8. ; *Sozial. Warte*, Paris, aŭg. (ankaŭ pri la kongr.) ; *De Vrijdenker*, Antv., 7.9. ; *Le Travail*, Verviers, ĉiumarde esp. angulo ; *De Nieuwe Fakkel*, Amsterd., 16.8. (ankaŭ pri la kongr.), 20., 27.9., 1.10 ; *La Grande Réforme*, Paris, jul. ; *O Emancipador*, L. Marques, 5., 12.8. (rubr.) ; *Le Ralliement*, Bruselo, 6.6. ; *Le Peuple*, Brus., 10., 18.9. ; *La Wallonie*, Liège, 17.5. ; *La Dépêche Normande*, Evreux, 20.9. ; *Le Combat Marxiste*, Paris, sept. ; *De Dag*, Antverp., 28.9.

PRI LA 15-A KONGRESO ENPRESIS : *Vanguardia, El Mati, El Diluvio, El Noticias Universal*, ĉiuj en Barcelono, 23. k 24.7. ; *Le Barrage*, Paris, 25.8. ; *Solidaridad Obrera*, Barcel., 23.8. (tre detala rap.) ; *L'Unité*, Paris, 7.9. ; *La Voz de Aragon*, Zaragozo, 8.8.

PERESPER. MATERIALON ENHAVIS : *Proa*, Barcel., 24.8. ; *Le Combat Syndicaliste*, Paris, 4.10.

Korespondado

FRANCIO

K-do poŝtoficisto *Thiéblemont*, 33, rue Verrerie, *Dijon*, dez. kor. k interŝanĝi PI, PM kun Gek-doj el ĉ. l. Certe respondos.

K-dino *Simone Brun*, Chemin de Baza, *Aubenas*, Ardèche, dez. korespondadi kun Ge-SAT-anoj el ĉiuj landoj.

Deziras kor. kun kom. anarkistoj el ĉiuj landoj, petas anark. gazetojn. Anglan lingvon. K-do *Bartelmy Ernest*, rue des Lilas, *Saint-Denis* (Seine).

HISPANIO.

Tri K-doj dez. kor. kĉl. Resp. gar. Skribu al K-do *Ramon Pedret*, Mallorca 564-3°-1a, *Barcelona*.

NEDERLANDO

Mi dez. kor. kun intelektaj Gek-doj el Franc., Suda Belg. (Luksemburgo) k Suda Anglio. Por apliki esp-on k eble viziti unu la alian en proksima estonto. Adr.: *E. Lehman*, Slaghekstr. 117 *b*, *Rotterdam*.

Gelern. de daŭriga kurso dez. grupe kor. kĉl., pĉt. Adr. : K-do *A. v. d. Starre*, Linschotenstr. 1, *Ymuiden*.

PORTUGALIO

Veterinara, medicina, matematika k jura universitataj studentoj dez. kor. kun ĉl. Gek-doj pĉt. Ni certe k tuj resp. Skribu al : *A. T. Duarte*, R. Andrade, 5-3e, *Lisboa*.

K-do *A. Liako* (19 483) dez. interŝanĝi esp. sigelmarkojn, str. Luciano Cordeiro 105, 4°, *Lisbono*.

SVEDIO.

Koresp-adon pri labor. temoj, interŝ. de gazetoj ktp kun Gek-doj deziras K-do *A. Nilsson*, Kv. Länsm. 4, *Finspong*.

RECENZEJO

JAPANUJO. Faldprospekto 20-paĝa kun 24 fotoj, kiuj liveras ioman enrigardon en la lando k ĝia kulturo. Ĝi estas eldonita de : *Direkcio por Turismo* (KOKUSAI KANKOO-KJOKU) en Japana Fervoja Ministerio, *Tokio*. Oni skribu al tiu adreso, por peti *senpagan* ekzempleron de tiu bele prezentita broŝuro.

MALGRANDA TERBIBLIO

titoliĝas provaĵo, laŭ laborista tendenco klarigi la geografiajn k demografiajn fenomenojn de la Tero. Kun 13 tutpaĝaj kartoj en formato 25 × 36 cm.

Prezo : nur 6.— fr. fr. SAT, 67, aven. Gambetta, Paris 20.